

SCIENCA REVUO

UDK 000/05/=089.2
Vol.23, n-ro 3/95/
25.6.1972.

Aperas sesfoje jare. Jarabono 55 steloj aŭ 4,50 us.dol. aŭ 75 din.

El la enhavo:

- E. Sonnenfeld: De la Prafundamento ĝis la Bulonja fundamento
S.K. Ĥvorostin: Cara cenzuro kaj Esperanto, II
R. Lewin k T. Nomra: La Drew Monumento en Uto, Japanio
M.T. Popov: Pri taĥiona fotono
Bogatirev-Matviĵin: Al konstruado de Ljapunov-funkcioj....
M. Bartovska: La teksokombilo
S. Kambel: Internacia sistemo de mezurunuoj
El sciencoj - "Subtereno" - tunelfarilo de estonto

DE LA PRAFUNDAMENTO ĜIS LA BULONJA FUNDAMENTO

(E. Sonnenfeld, Montevideo, Urugvajo)

En la n-ro 7/1971 (Julio/Aŭgusto) de Komuna Esperanto-Gazeto - organo de la Federacio de Esperanto-Organizaĵoj en Nederlando - aperis artikolo el la plumo de Teo Jung sub la titolo "D-ro Zamenhof iniciatoro de la tempisma konjugacio de Esperanto". - La artikolo estas speciale interesa, ĉar Teo Jung rimarkis ion, kion ŝajne aliaj esperantologoj ĝis nun pretervidis, nome ke en la unua eldono de la "Unua Libro - Por Germanoj" - antaŭ nelonge formoreprese novaperinta - en la regulo 6a de la Gramatiko troviĝas jena tekso pri la pasiva voĉo (en la germana lingvo): "Alle Formen des Passivs werden mit Hilfe der entsprechenden Form des Wortes *est* (sein) und des Participium praesentis passivi des gegebenen Zeitwortes gebildet, wobei die Präposition *de* gebraucht wird; ..." Esperanta traduko: "Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de la respektiva formo de la vorto *est* kaj de la participo de la prezenco pasiva de la donita verbo, ĉe kio la prepozicio *de* estas uzata;..."

Ni scias, ke la 5-lingva Gramatiko akceptita kiel parto de la Fundamento en 1905. baziĝas sur la kvin Unua-Libro-j, kvankam ne la teksto el la 1887-jara eldono fariĝis la oficiala, sed ja teksto pli posta, evidente iom reviziita, kiel ni vidas nun tutklare, sed kiel, cetero, ni jam sciis el alia detaleta, t. e. el la fakto, ke Zamenhof rezervis al si en tiu Unua Libro la rajton revizii la lingvon en la daŭro de unu jaro. kaj efektive li ŝanĝis la vortojn *ian, kian, tian, ĉian, nenian* je: *iam, kiam, tiam, ĉiam, neniam*. Nun ni do vidas, ke okazis alia ŝanĝeto (almenaŭ se ni juĝas laŭ la eldono por Germanoj).

La teksto, kiu servis kiel bazo en 1905. por la Fundamento troviĝas ankaŭ fotoreproduktita en la 9-a eldono kaj tie la sama teksto aperas modifita tiel, ke anstataŭ "Participium praesentis passivi" ni legas nur: "Participium passivi". Malaperis la vorto *praesentis*. Ĉu hazardo? Ĉu malatento? Certe ne, ĉar en ĉiuj kvin lingvoj la koncerna vorto forestas. Cetere estus interese scii, ĉu en 1887. en ĉiuj 5 lingvoj tiu vorto enestis aŭ ĉu nur en la eldono "por Germanoj". Teo Jung diras, ke tiu unua lernolibro por germanoj estis la fonto, el kiu la unuaj germanlingvanoj ĉerpis sian sistemon de t.n. "tempisma konjugacio" por la pasivo, dum la postaj generacioj tion simple imitis. En tio Teo Jung povas esti tre prava. Sed se oni bazas sin sur tiu "Unua Libro" por formi ĉiujn tempojn de la pasivo per *-ata* (prezenca pasivo), kiel oni do venis al la pluskvamperfekto akre defendata de la "tempisma" skolo (ekz. "estis farita")? La teksto de tiu unua eldono de la "Unua Libro - por Germanoj" povis ja nur toleri jenajn pluskvamperfektojn aŭ: estis estinta farata, aŭ estis jam antaŭe farata! Ita ja ne povis ekzisti en la pasiva konjugacio laŭ tiu prateksto!

Mi neniel intencas ĉi tie remalfermi la diskuton pri *ata/ita*, sed nur ekzameni la signifon de tiu nun rivelita teksto. Se ĝi estis tiel intencita (do se la vorto "praesentis" ne estis simpla eraro) de Zamenhof - kaj tiun eblecon ni ne povas simple forĵeti - ni povus nur konkludi, ke Zamenhof siatempe certe planis pasivon pli konforman al la eŭropaj lingvoj. Kun la sola formo *-ata* nature malaperus ĉiu diskuto pri *ata/ita* kaj ni h'avus la formojn: estas farata - estis farata - estos farata - estus farata - estu farata. La participoj *farita* kaj *farota* servus nur por uzado sen la helpverbo *esti*. Do ĉu atisme, ĉu itisme, ne ekzistus la formo "estis farita", nek estas, estos farota. Kompreneble inter la Prafundamento (Unua Libro - eldono 1887.) kaj la definitiva Fundamento do en la epoko, kiun mi nomus "prefundamenta", la lingvo trapasis evoluon kaj certe Zamenhof devis rimarki, ke ne eblis limigi la formojn *ita* kaj *ota* al nura participa uzo (ĉiam supozante, ke la vorto "praesentis" en 1887. estis vere intencita de Zamenhof kaj ne simpla plumeraro).

Konklude: pri la uzado de la tempoj (aparte de la tri simplaj: *-as*, *-is*, *-os*) nin povas nur gvidi la ekzemploj de la Ekzerccaro. La Akademio faris nenion alian ol la interpretadon de tiuj ekzemploj.